



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Esperanto ĉe la

Olimpikaj Ludoj

Montreal 1976

=====

Legu sur p. 2 !

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Plickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 27/1976 - 24 majo 1976

Aperas ĉiusemajne

RADIOVATIKANA



Radio Vaticana
en Esperanto.

En la maja programkajero de Radio Vaticana aperis oficiala anonco en Esperanto pri la mallongaj Esperanto-programoj de tiu stacio.



Ekde la 18^a de aprilo, ĉiudimanche surondiĝos mallonga programo en Esperanto, en la kadro de la dissendo « Kun vi dum la nokto ».

Temas pri malgranda paŝo, kiu tamen montras la estimon de la Vatikana Radio por la Esperanta idealo, kaj deziras kontentigi la multajn alvenintajn petojn.

La oficiala anonco en la kajero 5/76

Al interesuloj Radio Vaticana dissendas informilon, kiun ni ĉi-sekve publikigas:

"Kara aŭskultanto, La Sanktan Sabaton, 17-an de aprilo, je la 23,30 h. G.M.T., unuafoje surondiĝos per la Vatikana Radio dissendo en Esperanto, laŭ semajna ofteco.

Ĉi tio responde al la varma deziro de multaj ĉiulandaj katolikaj Esperantistoj, kiuj, dum nia tempo en kiu amaskomunikiloj estas je la servo de malbono kaj malvero, insiste petas, ke pli kaj pli la vorto de Kristo kaj de la Eklezio, ankaŭ per Esperanto, riparu, kompensu, prilumu.

Fakte ili, konsciaj ke la idealo de Esperanto - interfrateco de popoloj - estas esence kristana, ekde la naskiĝo de la Internacia Lingvo klopodis, per ke ĝi servu al la disvastigo de la vorto de Dio kaj al la instruoj de la Eklezio.

La dissendoj de la Vatikana Radio en Esperanto povos, komence, ŝajni tro malgranda paŝo, sed ili estu esprimo de nia aprezado kaj kuraĝigo, kvankam laŭ la limigitaj rimedoj pri kiuj ni disponas, kompare kun la vasteco de la evangeliza problemo.

La horo de niaj esperantaj programoj estis elektita ne senintence malfrua, por ebligi la plej efikan disvastigon ĉiudirektan per mezlonga ondo (1529 kHz) en la tuta Eŭropo kaj en la Mediteranea zono.

Ni nun petas de vi, ke vi bonvolu informi nin, ĉu vi povis bone aŭskulti, kaj ke vi esprimu konfide al ni viajn dezirojn kaj sugestojn, kiuj estos valora helpo al nia laboro.

La Itala Sekcio, kiu kunlaboras kun la Vatikana Radio en la Esperanta kampo salutas elkore vin, atendante viajn respondojn."

Oni skribu al: Vatikana Radio, Città del Vaticano

13 000 broŝuroj por olimpikaj atletoj

Montreal (pp) - Sub la titolo "Esperanto, internacia lingvo de amikeco 'Salut, ami' 'Hello, friend' 'Saluton, amiko' " aperis en eldonkvanto de 13 000 ekzempleroj trilingva frazaro kaj vortaro - franca, angla, Esperanta - pri sportaj kaj ĝeneralaj temoj okaze de la Olimpikaj Ludoj 1976 en Montreal, Kanado.

Eldonis ĝin kun financa helpo de esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj la Kanada Esperanto-Asocio. La broŝuro - en amplekso de 121 paĝoj, formato 12,5 x 17,2 cm - fakte estas la dua, pli ampleksa eldono de la sporta frazaro verkita de Ambasadoro Ralph Harry kaj eldonita de Ludwig Pickel, Nürnberg okaze de la Olimpikaj Ludoj 1972.

Laŭ informo de Kanada Esperanto-Asocio la broŝuro estos senpage disdonita al 11 400 atletoj kaj al 1 200 gejunuloj, kiuj partoprenos en la Olimpikaj Ludoj en Montreal.

Post la Olimpikaj Ludoj la broŝuro estos aĉetebla ankaŭ de esperantistoj kaj de aliaj interesuloj. Recenzo de la broŝuro sekvos en la venonta numero de Pilo-Press. Interesuloj, kiuj intencos aĉeti la broŝuron, anoncu sin ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Esperantistoj kiuj volas subteni tiun vere unikan varbkampanjon inter sportistoj, sendu siajn mondonacojn al: Kanada Esperanto-Asocio, P.O.B. 174, Roxboro, Quebec, Kanado H8Y 3E9.

Roger Rousseau, prezidanto kaj ĝenerala komisionano de la Organiza Komitato de la Olimpiaj Ludoj en Montreal, dediĉis al la broŝuro jenan antaŭparolon:

" Mi varme gratulas la Kanadan Esperanto-Asocion pro ĉi tiu libreto "Esperanto, Internacia Lingvo de Amikeco".

La verko estas des pli laŭdinda ĉar ĝi estas farita per la intima kunlaboro de Esperanto asocioj en diversaj landoj.

La celo de Esperanto estas klara: pliproksimigi la popolojn de ĉiuj nacioj per unusola komuna lingvo.

Sammaniere, la Olimpiaj Ludoj akcelas la universalan fratecon per sana sportkonkursado.

Dum la 21aj Olimpiaj Ludoj miloj de atletoj kaj aliaj reprezentantoj de la junularo tutmonda venos el kelkaj 130 landoj por partopreni en tiu ĉi granda festo kiun ni preparas.

Ĉi tiu libreto estas pli ol simpla olimpika vortaro. Ĝi permesos al la loĝantoj de la olimpika vilaĝo kaj de la internacia kampadejo junulara renkontiĝi kaj konversaci malgraŭ la multeco de la lingvoj parolataj.

Antaŭdenigante ĉi tiun facilan metodon de interkomunikado, Esperanton, la internacia Esperanto movado mem faras Olimpian taskon.

Roger Rousseau "

Mein geliebtes Esperanto

Laŭ informo de la eldonejo Bleicher Verlags-KG, Gerlingen, la poŝlibro en germana lingvo "Mein geliebtes Esperanto" de Richard Schulz (Mia amata Esperanto) aperos meze de junio. La vendoprezo estos 14,80 GM. Libroservo Ludwig Pickel, Postfach 2113, 8500 Nürnberg 1, ofertas la libron ĝis la 10-a de junio 1976 ankoraŭ je la favora subskripcia prezo de 11,80 GM. Mendu tuj!

Senpaga Scienca Numero de Heroldo

Bruselo (pp) - Interesuloj por sciencaj demandoj povas peti senpagan ekzempleron de la Scienca Suplemento de Heroldo de Esperanto, n-ro 7/76, kiu prilumas temojn pri lingvistiko kaj etnologio. Notinda estas la eseo de prof. M. Duc-Goninaz (Universitato de Aix-en-Provence, Francio) kaj la artikoloj de R. Lloancy (Tunizio) kaj G.H. Sutton (Svedio).

Interesiĝanto turnu sin al Heroldo de Esperanto, rue de la ReINETTE 13, bte. 28, B-1000 Bruselo, Belgio.

Alvoko al la Akademio de Esperanto

Blieskastel (pp) - La 7-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo (7 - 9 de majo 1976) aŭskultinte serion de prelegoj pri la Esperanta tradukarto far Fernando de Diego alvokas la Akademion de Esperanto kaj aparte ties Literaturan Sekcion, ke

- a) ĝi regule informu la Esperantan publikon pri la kvalito de la aperantaj tradukoj;
- b) ĝi kompilu liston de tradukoj ĝismnun aperintaj en Esperanto rekomendindaj el lingva vidpunkto;
- c) ĝi instigu kaj kontrolu la unuecigon de la naciaj Esperantaj vortaroj rilate ties rolon kiel tradukaj helpiloj.

Esperanto en Radio

Zagrebo. Ĉi-foje mi denove aŭskultis je meznokta tempo al tiu stacio. Post aktualaj informoj el Jugoslavio oni povis aŭdi sonraportojn pri la Esperanto-instruado en lernejo de jugoslavia urbo (bedaŭrinde mi ne bone komprenis la nomon!). Spontanee, vigne kaj korekte la lernantoj respondis al la demandoj de la instruistino, kiu instruas laŭ rekta metodo. (Nur la akuzativo estis problemo por kelkiu lernanto!).

Romo. Malgraŭ ĝenoj kaj intervenoj tiu stacio nun estas aŭdebla kaj komprenebla, almenaŭ de lerta aŭskultanto. Ĉi-foje estis aŭdebla ampleksa "Kuriero de Esperanto" kun informoj cititaj ankaŭ el Pilo-Press. El la leterkestoj montriĝas, ke FR Germanujo liveras plejmulte da korespondaĵoj.

La Roma programo, dimanĉe, de la 21 - 21,20 h, estas aŭdebla sur 25,42 m (11800 kHz), 30,90 m (9710 kHz), 41,24 m (7275 kHz). (valida de la 2.5. - 29.8.76) Adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma.

Varsovio. La ĉi-dimanĉa Esperanto-Ekspreso estis dediĉita al la printempa feriosemajno en Mielno ĉe la Balta Maro, kiun partoprenis sesdeko da esperantistoj el Pollando, GDR kaj FRG. Jerzy Grum, kiu ĉeestis la semajnon kun la mikrofono, prezentis sonraportojn pri oficialaj paroladoj kaj intervjuoj kun partoprenantoj. El FRG parolis s-ro Lose, Schwelm, lernanto de la konata Esperanto-aganto el Schwelm, Anton Kronshage.

En la ĉi-foja Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo, Jerzy Grum citis el gratuleteroj de germanaj aŭskultantoj okaze de la 10 000-a Esperanto-elsendo. La leterkesto daŭre kaptas la atenton de la aŭskultantoj. Lastsemajne eniris en Varsovio 89 korespondaĵoj.

Berno. D-ro A. Baur parolis pri la nova teatro en Basel, interesa instruo pri demokratio en financaj aferoj. Ges-roj Gacond elektis alian malnovan Esperanto-revuon, nome la "Revuon", el kiu ili citis pri literaturo konkurso kaj la "La floraj ludoj".

Vieno. Ankaŭ al Vieno venas la plej multaj korespondaĵoj el FRG, kiel oni povas konstati el la ĉiusemajna "Leterkesto". "Aŭstrio estas politike neŭtrala, sed ideologie okcidenta", jen frazo el la komentario ĉe dro Alfred Macher.

10-tagaĵ ekskursoj tra Pollando

valoraj objektaj premioj

atendas la eksterlandajn aŭskultantojn de la Pola Radio, kiuj respondos al jenaj demandoj:

- Kion vi scias pri la vivo, problemoj kaj rolo de la juna generacio de la nuntempa Pollando? Kiel oni aprezas en via lando la junan generacion kaj kiajn perspektivojn oni ligas kun ĝi?
- Kian signifon havas, laŭ via opinio, la internaciaj junularaj aranĝoj? Ĉu vi partoprenis en tiaj - se jes, kiajn impresojn vi elportis?
- Kiel vi aprezas la disaŭdigojn de la Pola Radio, dediĉitajn al la problemaro de la juna generacio? Je kiuj demandoj /temoj/ kaj kiel oni devus pliriĉigi tiujn ĉi dissendojn?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn oni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 15-a de junio 1976 j. /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 30-an de junio 1976 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras sukceson en lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio elsendas en Esperanto:

Je la 6,00 h sur 31 m, 49 m, 75 m, 200 m

Je la 16,30 h sur 31 m kaj 41 m

je la 22,30 h sur 49 m, 75 m, 200 m